Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 2 1975 | ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO | Redaktoro: Hans Amund Rosbach | 3-a periodo 42.a (51-a) jaro Dumonata

# 44-a Norvega Esperanto-kongreso

## KUNVOKO

Per ĉi tio ni kunvokas la 44an landan kongreson de Norvega Esperantista Ligo en hotelo Saga, Tromsø, la 5.—7. de Julio 1975. La unua laborkunsido komenciĝos la 5an de Julio je la 10.00.

Tagordo:

1. Malfermo per la prezidanto. Salutparoladoj.
2. Elekto de kunvenaj funkciuloj (protokolantoj, kunvena prezidanto, komisiono por plenrajtoj kaj voĉnombrado).
3. Jarraportoj 1973 kaj 1974.
4. Jarkalkuloj 1973 kaj 1974.
5. Alvenintaj proponoj (plialtigo de kotizoj, rezolucioj).
6. Esencaj taskoj de landa asocio: prelego de d.ro W. Bormann, vicprezidanto de U.E.A. kaj estrarano pri landaj asocioj. Diskutado.
7. Elekto de Liga Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj.
8. Eventualaĵoj.

Jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1974 troviĝas aliloke en ĉi tiu numero.

*Pri la punktoj 3 kaj 4.* Ĉar ne okazis landa kunveno en 1974, la jarraporto kaj la jarkalkuloj pri 1973 ne estas traktitaj kaj aprobitaj de landa kunveno. La raporto kaj kalkuloj pri 1973 kaj 1974 estas egale redaktitaj. La Estaro proponas legi nur tiujn pri 1974 dum la ĉi-jara kunveno, sed petas la membrojn tralegi antaŭe tiujn pri 1973 en Norvega Esperantisto n.ro 2/1974, tiel ke oni povu ambaŭ jarojn kune pritrakti.

*Pri punkto 5.* Post la pasinta landa kongreso la afranko jam dufoje grave plialtiĝis, kaj ankaŭ preskostoj kaj ĉiuj aliaj prezoj simile kreskis. Sekve la Estraro kun bedaŭro trovas necese proponi plialtigon de la kotizoj de ĉiuj kategorioj de klubanoj kaj rektaj membroj (escepte de junaj familiaj membroj) per po kr. 5,—; la kotizojn de dumvivaj membroj oni proponas

(daŭr. p. 20)

# Sciigoj de N.E.L.

*Norvega Esperantisto.* Ofte kelkaj membroj pagas sian kotizon tre malfrue en la jaro. Tio kaŭzas malagrablaĵojn al ili kaj al ni. Tiu ĉi numero estas la lasta, kiun ni sendas al nepagintaj klubaj kaj rektaj membroj kaj aliaj abonantoj. Kiam poste ni ricevos la kotizon, ni postsendos la numerojn, kiujn la koncerna membro ne ricevis, sed ja estas maloportune ricevi kelkajn malnovajn numerojn kune. Tial estas konsilinde pagi la kotizon frue, kiel postulas la statuto. Tio ankaŭ ŝparas al ni multe da nenecesa ekstra laboro.

*Taskotabelo por kluboj.* — *Aprilo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizojn kaj liston pri la malfruiĝintaj kaj eventualaj novaj membroj.

*Majo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La Estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj starigas planojn pri kursoj kaj aliaj aktivecoj dum la venonta aŭtuno.

*La Liga Estraro*

*La kontorfondaĵo 1974*

| | |
|---|---|
| Pli frue | kr. 1611,20 |
| Anonima | » 10,00 |
| E. Gjessing | » 5,00 |
| H. Danielsen | » 200,00 |
| | kr. 1826,20 |

*La kontorfondaĵo 1975*

| | |
|---|---|
| G. Ringstad | kr. 10,— |
| O. Mæland | » 55,— |
| Aa. Falch | » 17,— |
| Aase Haube Nielsen | » 35,— |
| Sauda Esp.klubb | » 100,— |
| Bjarne Aandahl | » 50,— |
| C. S. B. | » 20,— |
| Aslaug Refsing | » 200,— |
| S. Korstvedt | » 30,— |
| S. J. Ebeltoft | » 30,— |
| Ågot Pedersen | » 30,— |
| Ascendo, Halden | » 26,— |
| | kr. 603,— |

*Propaganda Fondaĵo 1975*

| | |
|---|---|
| Anonima | kr. 119,— |

*Kampanjo Reisæter 1975*

| | |
|---|---|
| T. Reisæter | kr. 100,— |
| Aslaug Refsing | » 100,— |
| Signe Korstvedt | » 100,— |
| | kr. 300,— |

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

*Subtenantaj Membroj:*

Olaf Mæland
Aslaug Refsing
Ågot Pedersen
Elna Matland
Johan Matland
Karl Pedersen
Steffen Kjetland
Ole J. Rønnevig

NORVEGA ESPERANTISTO

**Norvega Esperantisto**
ESPERANTOBLADET

**Provizora redaktoro:**
Hans Amund Rosbach
Johan Hammond Rosbach

**Adreso de la redakcio:**
Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N
(Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.)

**Abonprezo:** En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

**Anoncprezoj:** 1/1 p. kr. 150, ½ p. kr. 75, ¼ p. kr. 40, ⅛ p. kr. 20.

## *Universala Esperanto-Asocio alvokas vin.*

La nova estraro de U.E.A., elektita dum la kongreso en Hamburgo, energie laboras por fari nian mondan asocion vere efika, potenca batalanto por la Internacia Lingvo. Sed ĝi renkontis grandegajn problemojn, kiujn ĝi povos venki nur per celkonscia kunlaboro de ĉiuj siaj membroj tra la tuta mondo.

La inflacio estas la koboldo, kiu minacas la ekzistadon de ĉiuj organizaĵoj. Senĉese plialtiĝadas afranko, preskostoj, salajroj kaj ĉiuj aliaj prezoj. En Nederlando ekzistas devigaj minimumaj salajroj, kiuj altiĝadas paralele kun ĉiuj aliaj kostoj. Dum la lastaj 2—3 jaroj la asocio havis ĉiujare konsiderindan deficiton (meznombre po 60 000 guldenoj = n. kr. 120 000). Evidente tio ne povos daŭri, alie la asocia kapitalo baldaŭ estos foruzita.

Paralele kun tiuj gravaj deficitoj okazis nekutime granda investo de rimedoj en eldona aktiveco. Alia problemo estas la landoj, el kiuj oni ne rajtas transpagi siajn kotizojn. U.E.A. venis en situacion, kiu postulas subtenon flanke de ĉiu serioza esperantisto.

La nova estraro de U.E.A. nun dediĉas grandan parton de sia energio kaj laboro al sanigo de la ekonomia situacio. I. a. ĝi draste reduktis la personaron de la Centra Oficejo, kio pligrandigas la ŝarĝon sur la restantaj oficistoj. Efektive oni tranĉis la elspezojn ĝis la ostoj. Sed pli grave estas pligrandigi la enspezojn. I. a. oni serĉos subtenon de fondaĵoj en diversaj landoj, sed antaŭ ĉio oni apelacias al ĉiu esperantisto fariĝi Individua Membro de U.E.A.

Kion *vi* povas fari por helpi? 1) Vi povos fariĝi Membro-Abonanto de U.E.A., per kio vi ricevos la Jarlibron kaj la revuon «Esperanto» (kr. 100,- pagebla al la Ĉefdelegito, Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6, poŝtĝiro 1 33 29); verdire estas nekomprenebie, kiel vera esperantisto povas vivi sen la Jarlibro kun la listo de la Delegitoj tra la mondo, kaj sen la revuo «Esperanto», la oficiala organo de nia movado, kiu nun aperas en tre moderna, plaĉa aspekto, kun tre varia enhavo. En 1974 estis nur 80 Individuaj Membroj de U.E.A. en Norvegujo. Nia celo estu 160 en 1975! — 2) Vi povas aĉeti la eldonaĵojn de U.E.A., ni mencias precipe la novan, grandan verkon «Esperanto en perspektivo» (kr. 180). 3) Vi povas donaci al la diversaj fondaĵoj de U.E.A. 4) La kluboj povus ekz. dediĉi la profiton de lotumado dum iu klub-

tiel demonstracii sian solidarecon.

Pluraj norvegoj jam estis subtenantoj de U.E.A.; ni esperas pri ilia daŭra subteno. La subteno eble estas ofero, sed ofero, kiun ĉiu, kiu havas la ekonomian eblecon, devus permesi al si. Eble oni devas malhavi ion alian, sed kompense oni havos la kontentigon kontribui al plifortigo de Esperanto internacie. Se ĉiuj kune agos, jam la jaro 1975 povos finiĝi sen deficito. Tio donus al U.E.A. la eblecon denove entrepreni pliajn gravajn paŝojn por la antaŭenigo de Esperanto.

*C. Støp-Bowitz*
Vicprezidanto de U.E.A.

*Alfred Skyberg*
Ĉefdelegito de U.E.A.

## 44-a Norvega Esp.-kongreso

(daŭr. de p. 17)

fiksi al 20-oblo de la kotizo de ordinara klubano por personoj malpli ol 60-jaraj, 10-oblo por personoj pli ol 60-jaraj. Oni antaŭvidas proponojn ankaŭ pri unu aŭ pluraj rezolucioj.

*Pri punkto 6.* La estrarano de U.E.A. pri landaj asocioj, d.ro W. Bormann, anoncis sian partoprenon en nia kongreso, kaj estas preta per prelego enkonduki al diskuto pri la menciita temo. Se la tempo permesos, li estas preta prelegi ankaŭ pri alia temo, ekz. Homaj Rajtoj kaj Lingva Diskriminacio.

*Pri punkto 8.* Se tio ne estos farita sub alia punkto, oni ĉi tie devos trakti la admonon de la estraro formulitan en la konkludo de la jarraporto 1974.

*La Liga Estraro.*

## Al la Estraro de N.E.L.

Mi esprimas mian profundan dankon al la Estraro de Norvega Esperantista Ligo pro la tre alta titolo — Honora Prezidanto — kiun ĝi donis al mi okaze de mia 80-a reveno de mia naskiĝtago, kaj pro la bele pentrita diplomo per kiu ĝi konfirmis la nomigon, transdonita al mi en mia hejmo de la Prezidanto (Carl Støp-Bowitz) en ĉeesto ankaŭ de la Generala Sekretario (John Berggreen) je la tago mem.

La decido de la Estraro estis por mi ĝojiga surprizo. Ĝi prezentas grandan honorigon, kiun mi apenaŭ meritis.

Mi esperas ke mi kapablos montri min digna al la nova posteno per mia estonta laŭpova laborado por nia bona kaj justa afero.

*Rolf Bugge-Paulsen.*

**HELSINGØR 1975**

*tuj antaŭ UK de Kopenhago*

La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.—26. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago.

Programo senpage havebla ĉe

EVA LANGKILDE
Ingemannsvej 18
DK-3000 **Helsingør**, Danlando





## Donacoj

Denove ni povas danki pro bela poŝtmarka donaco al nia gazeto — kaj denove la danko iras eksterlanden. Koran dankon al s.ro Jean Amouroux en Perpignan!

Samtempe ni permesas al ni memorigi ankaŭ niajn norvegajn legantojn pri tio, ke ni daŭre kolektas uzitajn poŝtmarkojn por fortigi nian ekonomion (kiun ankoraŭ pli premos la altigita afranko!). La poŝtmarkojn ordigas kaj vendas la «sekcio» en Sarpsborg. Tial: ĉio pri poŝtmarkoj rekte al Huldervn. 17 B, 1700 Sarpsborg. — Antaŭan dankon!

Bladet tar imot brukte frimerker til styrkelse av økonomien. Adresse Sarpsborg.

*JHR*

## Ni vendas!

La redakcio de Norvega Esperantisto, la «sekcio» en Sarpsborg (adreso Hulderveien 17 B) vendas uzitajn poŝtmarkojn por fortigi la ekonomion de la gazeto.

Ĝuste nun vi povas mendi *arabajn* pm. (po kr. 0,50) tre belajn! Aŭ vi povas mendi laŭ temo: birdoj, floroj, hundoj, katoj, ĉevaloj, ŝipoj, pentraĵoj. — Cetere ni vendas pm. por po kr. 0,10 aŭ por po kr. 0,20. (La vendado de tiaj enkasigas multajn kronojn en Sarpsborg!)

Estas eble aĉeti ankaŭ saketojn da pm. Prezoj: 5 kr. ĝis 100 kr.

a. Se vi konas kolektantajn infanojn, vi ne bezonas plu cerbumi pri ideoj de donacoj.

b. Se vi mem kolektas, skribu al ni!

c. Se vi ne kolektas, vi certe emos kolekti laŭ iu temo, se vi ekvidos niajn plej belajn poŝtmarkojn.

Kaj se nek a) nek b) nek c) taŭgas por vi, vi tamen povas aĉeti pm. — pro la bona celo!

Redaksjonen i Sarpsborg selger brukte frimerker, dels til stykkpris, dels i poser. Inntektene går til dekning av portoutgifter for redaksjonen.

*JHR*

## Ĉu vi tradukas?

La analizadon de frazoj sub ĉi tiu titolo, kiun «Ak. III» faris en la pasintaj numeroj, mi trovas treege valora, kaj mi esperas, ke li daŭrigos, por bona helpo al ĉiu, kiu serioze deziras perfektiĝi en la uzado de nia lingvo. Sed mi scivolas, kie li trovis la 4an frazon (en n.ro 6/1974, p. 91), ĉar ĝi enhavas botanikan eraron: bananoj ja ne kreskas sur arboj, sed sur grandegaj herboj. Sekve *bananujo* estus akceptebla, sed ne *bananarbo*. Tamen mi preferus bananplanto.

*C.S.B.*

## *Alta*

Laŭ iniciato de s.ino Julie Romsdal, kiu gvidis kurson kaj studrondon, la 29-an de Januaro fondiĝis en Alta, Finnmarko, nova klubo «La Espero», Alta Esperantoklubb; prezidanto estas instruisto Harald Strand, sekretario Julie Romsdal, kasistino Anna Mørk. La klubo estas la plej norda en Norvegujo, eble en la tuta mondo! La klubo aliĝis al N.E.L., kaj ni deziras al ĝi koran bonvenon!

# NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

## *Jarraporto 1974*

ESTRADO

*La Liga Konsilantaro* dum la tuta jaro konsistis el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz
Vicprezidanto: Kjell Gustavsen
Ĝenerala sekretario: John Berggreen
Sekretario: Signe Korstvedt
Kasisto: Aase Haube Nielsen
Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek
Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Otto Prytz, Nils Chr. Stenseth.

Ceteraj konsilantaranoj:

Lars Kåre Hunnes, Trondhejmo
Per Johan Krogstie, Løten
Elna Matland, Sauda
Herolv Olsen, Tromsø
Ole J. Rønnevig, Haugesund

Revizoroj:

Aslaug Refsing, John Selbekk.

*Landa kongreso* ne okazis dum 1974.

ADMINISTRADO

*Estrarkunvenoj.* Okazis 7 estrarkunvenoj (7 en 1973), kaj oni protokolis 85 punktojn (85 en 1973).

*Cirkuleroj.* La estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 4 cirkulerojn, i. a. kun invito al mendo de donackaj propagandabonoj al Norvega Esperantisto. 2 el la cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj. Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto.

*Oficejo.* La tenado de la oficejo en General Birchsgt. 30 estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de la membroj per la «oficeja fondaĵo» («kontorfondaĵo»). Pluraj pagas liberovolan monatan kontribuon. La oficejo servas samtempe por Eldonejo Esperanto A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas parton de luprezo. En la malnova oficejo en Nedre Slottsgt. 3 oni kolektis la bibliotekon. La oficejon estris precipe la prezidanto. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laborojn dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon.

*La «Oficeja Fondaĵo»* dum la jaro donace ricevis kr. 1826,30 (en 1973 kr. 1918,50). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

*Kampanjo Reisæter.* En 1974 23 personoj kaj unu distrikto donacis kr. 3000 (2 personoj pagis tuj por 3 jaroj, Okcidenta Distrikto kr. 300). La ekstra enspezo per tiu kampanjo efektive savis la Ligon de kriza deficito kaj donis al la Estraro iom pli liberajn manojn ion entrepreni en la intereso de Esperanto.

*Kunlaboro kun N. E. F. A.* Daŭre bone funkcias la interkonsento kun Norvega Esperantista Fervojista Asocio. Ĝi disponas unu paĝon en Norvega Esperantisto, ĉiuj membroj de N.E.F.A. estas abonantoj de Norvega Esperantisto, kaj la kaso de N.E.F.A. pagis kr. 500 kiel kontribuon al la preskostoj.





DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

*Distriktoj.* Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris, parte ankaŭ Orienta Distrikto, dum Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. NordNorvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

*Kluboj.* Je la jarfino 1973 N.E.L. havis 18 aliĝintajn klubojn. Neniu nova klubo fondiĝis, neniu malfondiĝis. Je la jarfino 1974 N.E.L. sekve havis 18 klubojn.

Membrostatistiko:

| | |
|---|---|
| Bergen, La Esp.klubo de, Ok.D. | 19 |
| Bodø Esperantoklubb, N. D. | 11 |
| Bryne, Jæren, La Vanelo, Ok. D. | 8 |
| Gjøvik, Klubo Esp.ista de, Or.D. | 5 |
| Halden, Ascendo, Or. D. | 23 |
| Harstad, Noktomeza Suno, N.N.E.D. | 5 |
| Haugesund, Mara Vento, Ok.D. | 49 |
| Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok. D. | 6 |
| Kristiansands Esperantoklubb | 15 |
| Mo, La Esperantoklubo de, N. D. | 5 |
| Odda, La Glaciaro, Ok. D. | 5 |
| Oslo, Klubo Esp.ista en, Or. D. | 129 |
| Sarpsborg, La Urso, Or. D. | 17 |
| Sauda Esperantoklubb, Ok. D. | 18 |
| Skien, Grenland Esp.klubb, Or.D. | 10 |
| Tromsø, La Norda Lumo, N.N.E.D. | 9 |
| Trondhejmo, Grupo Esperantista, M. D. | 26 |
| Sumo: | 368 |
| Individuaj membroj | 119 |
| Entute: | 487 |

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas.

Specifo de la membraro laŭ kategorioj:

| | | |
|---|---|---|
| Klubanoj: | | |
| Ordinaraj | 262 | |
| Junulaj | 22 | |
| Familiaj | 60 | |
| Junaj familiaj | 9 | |
| Honoraj | 2 | |
| Dumvivaj | 2 | |
| Subtenantaj | 11 | |
| | | 368 |
| Individuaj membroj: | | |
| Rektaj membroj ordinaraj | 85 | |
| Rektaj membroj junulaj | 9 | |
| Rektaj membroj familiaj | 3 | |
| | | 97 |
| Dumvivaj membroj | | 14 |
| Subtenantaj membroj | | 8 |
| Entute: | | 487 |
| Aliĝintaj dum la 4a jarkvarono ne pagintaj kotizon por 1974 | | 3 |
| | | 490 |

Krome pagis 4 kontribuaj membroj. Entute la membronombro montras malkreskon de 22 membroj, t.e. 4,2% kompare kun la antaŭa jaro.

KLUBLABORO

*Superrigardo.* (Ĉar nur 12 el la 18 kluboj ĝis nun sendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj eble estas tro malaltaj.) Suma membronombro je la 1/1 1974: 390. Aliĝoj: 21, eksiĝoj: 43. Membronombro je la 31/12: 368. — Okazis 136 klubkunvenoj, meznombre ĉeestis 53 %. Raportiĝis 35 estrarkunvenoj, 11 festoj, ekskursoj k.t.p. En 2 kluboj laboris 2 studrondoj kun proks. 10 membroj. 6 kluboj raportas pri biblioteko kun 234 volumoj. 44 klubanoj posedas ele-

mentan ekzamenon, 36 superan, 4 instruistan.

La kluboj grandparte kontentige raportadis, sed la estraro ankaŭ zorge memorigis pri mankantaj raportoj. La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona.

*Teatra Sekcio*, gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

STUDLABORO

*Kursgvidantoj.* Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1974, sed en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataĵ de lokaj fortoj.

*Kursoj.* Raportiĝis nur 4 kursoj por komencantoj kun sume 21 kursanoj en Kristiansand, Oslo, Tromsø, neniu kurso por progresantoj, sed en 2 kluboj laboris studrondoj por progresantoj. Kredeble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

*Korespondaj kursoj.* La funkciigon de la kursoj transprenis «Folkets Brevskole», aĉetante la kurstekstojn de ni; N.E.L. nur reklamas, p eras mendojn, kaj varbas la plenumintojn kiel membrojn. Nia Sekcio pri Koresponda Instruado estas en likvidiĝo, prizorgante nur niajn lernantojn el pli fruaj jaroj. La vendadon de la kurslibroj kiel ordinaraj lernolibroj prizorgas N.E.L., parte per Eldonejo Esperanto A/S. Ankaŭ «Folkets Brevskole» anoncas la kursojn inter siaj aliaj kursoj. — Per N.E.L. aliĝis 10 lernantoj en la unua parto, kaj laŭ la malnova aranĝo 2 al la dua parto. Ĉe «Folkets Brevskole» rekte aliĝis 11 al la unua parto. La dua parto aperis bindita en la fino de la jaro. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, kaj ne jam estis membroj, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. Instruis precipe Lars Kåre Hunnes. Por presigo de informmaterialo oni prunteprenis kr. 2400 de la Liga kaso (pagota el la Propaganda Fondaĵo), kaj por bindado de la dua parto kr. 3000 de la Propaganda Fondaĵo.

*Gazeta kurso* aperis en 1974 en neniu gazeto.

*Perfektiga studado.* La Ekzamena Komisiono ankaŭ en 1974 korektadis taskojn por interesiĝantoj. Oni aparte klopodis igi la membrojn studi por ekzameno.

*Ekzamenoj.* Ordinara ekzameno en Majo en Oslo. 2 kandidatoj plenumis la elementan ekzamenon. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Otto Prytz kaj Einar Gustavsen (membroj). — Ekzistas 5 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Trondhejmo, Østfold, kaj 7 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

INFORMADO

*Informa Fako* (Komisiito pri Informado: Ludv. Anjer). La komisiito dissendis cirkulerojn i. a. pri agado rilatanta al la Semajno de Internacia Amikeco kaj pri la Universala Kongreso en Hamburgo. Li reprezentis la Ligon en la kunsido de Informaj Fakoj en la Kongreso en Hamburgo.

*La Propaganda Fondaĵo* ricevis donacojn de kr. 230,00. Bankinterezoj estis kr. 314,50. El la fondaĵo oni uzis neniom. La fondaĵo posedas je la jarfino kr. 11017,36, el kiu sumo oni pruntedonis por la presigo de la novaj lernolibroj kr. 7473,34.

*«Esperanto-nytt».* Ankaŭ en 1974 la komisiito pri informado ne reaperigis tiur informbultenon.

*Informbroŝuroj.* Kelkaj kluboj aĉetis kvantetojn de la 2 broŝuroj. De «Det internasjonale språket — Esperanto» restas proks. 16000 ekzempleroj, de «La Internacia Lingvo Esperanto» proks. 6000, de la flugfolio proks. 3000. La faldfolio «Velkommen til Esperanto-bevegelsen» estas disdonata al ĉiuj kursanoj.

*Gazetara Servo*, gvidata de Elna Matland, elsendis al la norvegaj ĵurnaloj 7 bultenojn kun sume 22 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Oni registris 267 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 94 novaĵojn kaj 56 artikolojn, debataĵojn, referaĵojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 417 aperigojn (397 en 1973) en 100 gazetoj kaj revuoj (99 en 1973). Atakoj al Esperanto apenaŭ aperis.

*Radio kaj televido* (komisiito: Kirsten Ek). Estas registritaj nur 3 mallongaj mencioj pri Esperanto en radio kaj unu el televido en programo pri Oomoto.

*Interŝtataj organizaĵoj* (komisiito: R. Bugge-Paulsen). Pri la skandinavia propono al UNESKO estas nenio nova. La komisiito kunlaboris en la planoj pri havigo de proponoj (ĉi-foje nur anglalingvaj landoj) pri U.E.A. kiel kandidato de la pacpremio de Nobel en 1975. Pri la Nordlanda Konsilantaro estas nenia novaĵo.

*Blinduloj* (komisiito: Otto Prytz). La sonbenda eldono de Norvega Esperantisto, prizorgata de Ludvig Anjer, havis 6 abonantojn, kaj Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo estis daŭre surbendigata de John Berggreen por la blindaj membroj. Proponita kurso en la blindullernejo Huseby ne okazis, pro manko de interesiĝo flanke de la lernantoj. Inter aliaj blinduloj en Oslo raportiĝas iom da interesiĝo, sed kurso ĝis nun ne povis efektiviĝi.

*Skoltoj.* La komisiito, Hans Amund Rosbach, aperigis paĝon pri Esperanto en gazeto de skolta trupo, kaj sendos ĝin ankaŭ al pliaj. La ĝenerala sekretario daŭrigas la laboron por oficialigo de Esperanto dum la monda jamboreo ĉe Lillehammer en 1975.

*La Junulara Sekcio*, gvidata de Nils Chr. Stenseth, ampleksas 37 membrojn, inter ili 8 junulaj membroj de Studenta Esperanto-Societo en Oslo. Pro alia okupiteco de la gvidanto estis malmulte da aktiveco. La Studenta Esperanto-Societo daŭre aktivas, i. a. ĝi kolektis 10 manuskriptojn por la manuskript-serio en la Universitata Biblioteko. La societo estas grupo de Klubo Esperantista en Oslo.

*Faksekcio de Instruistoj.* La estraro konsistas el Elna Matland (prez.), Margrete Landmark (sekr.), Olav Andersen (estrarano). La sekcio havas 43 membrojn en ĉiuj specoj de lernejoj. Oni faris anonckampanjon en «Norsk Skoleblad» kaj sukcesis enmeti Esperanton kiel studtemon en

la «Modelplanon por la baza lernejo». Sekve de tio oni proponis al «Statens Lærarkurs» okazigi kurson por instruistoj. La sekcio aliĝis al I.L.E.I., kaj la sekretario partoprenis la I.L.E.I.-kunsidojn dum la Universala Kongreso en Hamburgo. Oni klopodas pri partopreno de Norvegujo en la eksperimenta instruado de la «3a regiono» de I.L.E.I.

*Informaj prelegoj.* Raportiĝis nur unu informa prelego en Kristiansand, kun proks. 65 aŭskultintoj.

*Prelegvojaĝoj* ne okazis en 1974.

*Agado «Publikaj Rilatoj».* En Majo 1974 oni elsendis cirkuleron pri la Esperanto-movado, kun aldono pri eldiroj de mondkonataj personoj, kaj krome kun broŝuro pri la Internacia Lingvo. La cirkulero estis sendata al ĉiuj 15 ministroj kaj 14 ministerioj, la 155 parlamentanoj, ĉiuj politikaj partioj kaj iliaj gazetar-oficejoj, la Norvega Radio, NTB, LO, AOF kaj la Student-Asocio, al 94 landaj asocioj diversspecaj, kaj al ĉiuj Distrikt-Altlernejoj, entute 313 elsendoj. Kun la cirkulero sekvis demandaro por resendo, sed resendis ĝin nur 6 instancoj. Tamen oni supozas, ke la Agado. P.R. havis bonan informan efikon, kiam oni pripensas, ke la ricevintoj estis la plej altaj aŭtoritatuloj kaj signifoplenaj organizaĵoj en Norvegujo.

DIVERSAJOJ

*Norvega Esperantisto.* La redakcia komitato konsistis el Hans Amund Rosbach, Kristiansund, provizora ĉefredaktoro, kaj Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg. Ĝis la jarfino nova ĉefredaktoro ne estas trovita. — La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj, kiel en 1973. La «Fervojista Paĝo» de N.E.F.A. en ĉiu numero sub redakto de Odd Kolbrek estis ŝatata legaĵo ankaŭ de nefervojistoj. La revuo denove aperas presita, nun ĉe Haaves Boktrykkeri, Br.dal, kaj la kontakto kun la presejo estas tre bona. La ekspedadon tre akurate prizorgis Randolf Grotmål. — Aperis 6 ordinaraj numeroj 16-paĝaj, sume 96 paĝoj.

*«Pro Merito».* Ordena promocio ne okazis dum 1974.

*Biblioteko.* La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de N.E.L., cetere la Biblioteko estas kolektita en la malnova oficejo en Nedre Slottsgt. 3, kie Stefan Murak kaj Tom Arbo Høeg laboras pri ĝia ordigo. La kresko de la Biblioteko rezultis ĉefe el recenz-ekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj interŝanĝe kun ĝi. Pruntedoniĝis nur 4 libroj.

*Nordlanda kunlaboro.* Nordlanda Esperanto-Komitato daŭre ne montris aktivecon. La Kunlabora Komisiono, konsistanta el la prezidantoj de la 4 landaj asocioj (dana, finna, norvega kaj sveda), laboris precipe per korespondado kaj interŝanĝado de cirkuleroj; ĝi ne kunsidis en 1974.

*«Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn».* La kunlaboro kun tiu asocio estas bona. Pluraj kopioj de ĝiaj filmoj «Bonvenon al Oslo» kaj «Oslo — la vikinga ĉefurbo» cirkuladas en la mondo. Oni daŭre distribuadis la turistbroŝuron al petintoj en diversaj landoj.





*Norvega Ŝtata Fervojo.* Ankaŭ ties filmo «Mi estis tie» cirkuladas en la mondo, kaj oni helpis disvastigi ĝian broŝuron kaj tiun de la Fervojmuzeo en Hamar.

*Turisma Servo de N.E.L.*, sub gvidado de Kirsten Ek, peris informojn kaj aliĝojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Hamburgo kaj aranĝis ŝipkaravanon al la kongreso. Aŭtune oni dissendis informojn pri la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, kaj komencis plani komunan vojaĝon el suda Norvegujo al la 44a Norvega Esperanto-Kongreso en Tromsø.

*Internacia Organizo.* La kunlaboro kun U.E.A. estis kontentiga. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A por N.E.L. estas Ludvig Anjer, kiu en Hamburgo elektiĝis en la statut-revizian komisionon. C. Støp-Bowitz estis Komitatano B ĝis la kongreso, tie elektiĝis Komitatano C kaj vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado en la nova estraro de U.E.A. En 1974 estis 62 Delegitoj en 20 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 80.

*59a Universala Kongreso de Esperanto* okazis en Hamburgo. Partoprenis proks. 20 norvegoj. Reprezentanto de N.E.L. estis C. Støp-Bowitz, de la Norvega Registaro R. Bugge-Paulsen.

*Helpagado.* Oni daŭrigas la kunlaboron precipe kun Mocambiko.

*«Vivo de Zamenhof».* La transprenita stoko de la norvega eldono de Privat: «Vivo de Zamenhof» estas disvendata por kr. 3,- (en 1974 vendiĝis 73 ekzempleroj). La stoko estas pagita, tiel ke la vendosumo reprezentas netan gajnon.

*Semajno de Internacia Amikeco.* Ankaŭ en 74 la aranĝo vekis intereson inter la membroj en multaj lokoj.

*Sliparo pri norvegaj esperantistoj.* La sliparo ampleksas nun 10088 slipojn pri esperantistoj en 794 lokoj.

*Korespondа statistiko.* N.E.L. kun ĉiuj komisiitoj kaj sekcioj dum la jaro ricevis 1331 leterojn kaj 1007 presaĵojn kaj sendis 871 leterojn kaj 1804 presaĵojn.

*La intereso pri Esperanto* evidente ekzistas latente en la publiko, sed malmultaj prenas sur sin la iniciaton efektive lerni la lingvon. La grave plialtigitaj prezoj de la novaj korespondaj kursoj evidente bremsis la alfluon de kursanoj.

*Konkludo.* En 1974 ni denove spertis malkreskon de la membronombro. Ŝajnas, ke la kluboj grandparte ne kapablas ŝanĝi tiun tre nekontentigan situacion, kaj la estraro insiste admonas al la landa kunveno serĉi rimedojn por plibonigi ĝin. Devas troviĝi metodo por konverti la latentan intereson ekzistantan en la publiko en aktivan iniciaton lerni la lingvon kaj ekagi por ĝia disvastigo.

Oslo, la 31an de Decembro 1974 / la 27an de Februaro 1975

*C. Støp-Bowitz* *Kjell Gustavsen*
*John Berggreen* *Signe Korstvedt*
*Aase Haube Nielsen*
*Olav Rygg* *Kirsten Ek*

# *Jarkalkulo de Norvega Esperantista Ligo*

## SPEZOJ 1974

*Enspezoj:*

| | |
|---|---|
| Klubkotizoj | 4 675,00 |
| Rektaj membroj | 2 042,00 |
| Norvega Esperantisto, membro-abonoj | 4 600,00 |
| Norvega Esperantisto, rektaj abonoj, anoncoj, kontribuo | 2 098,00 |
| Rentumoj | 185,33 |
| Donacoj, lukontribuo | 2 726,20 |
| El la kontorfondaĵo | 186,00 |
| Kampanjo Reisæter | 2 600,00 |
| El la kapitalo, deficito | 531,11 |

*Elspezoj:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Kostoj | | 4 546,04 | |
| Amortizo | | 170,00 | |
| Norvega Esperantisto, presado | 6 698,35 | | |
| distribuado | 1 613,15 | | |
| | | 8 311,50 | |
| Lupago | | 2 912,00 | |
| Afranko | | 1 406,00 | |
| Gazetara Servo | | 1 547,75 | |
| Kotizoj al U.E.A. | | 417,00 | |
| Kotizoj al distriktoj 1973 | | 179,00 | |
| Kotizoj al distriktoj 1974 | | 154,50 | |
| | | 19 643,99 | 19 643,99 |

# KORESPONDU!

La persona interkorespondado inter litovaj kaj norvegaj esperantistoj estas dezirata. Klaipeda Esperanto-Klubo, P.k. 179, Klaipeda, Litovio 235800, Sovetunio.

27-jara ekonomiistino tre volas korespondi kun geesperantistoj el via lando. Interesas min muziko kaj grava k. malpeza, sporto, turismo, filmo, teatro, psikologio. Tereza Dziedzic, str. Wiejska 25, PL-58-560 CIEPLICE sl., Pollando.

90 gejunuloj, komencantoj el mezlernejoj, deziras havi en via lando geamikojn, korespondado, kaj eĉ ekkoni persone. Skribu al: Koter Kazimiera, ul. 1-go Maja 32 m. 17, PL-20-410 LUBLIN, Pollando.





## BILANCO je 31/12 1974

| | | | |
|---|---|---|---|
| *Aktivaĵoj:* | | | |
| En la kaso | | 946,92 | |
| Poŝtĝirokonto | | 3 822,53 | |
| Meblaro | 1 716,88 | | |
| ÷ amortizo | 170,00 | | |
| | | 1 546,88 | |
| 254 akcioj en Eldonejo Esperanto A/S | | 5 588,00 | |
| Debitoroj: | | | |
| Prop.fond en Oslo Sparebank | 3 344,02 | | |
| Andresens Bank | 6 511,75 | | |
| Div. debitoroj | 8 674,51 | | |
| | | 18 530,28 | |
| *Pasivaĵoj:* | | | |
| Div. kreditoroj | | | 7 048,96 |
| La kontorfondaĵo | 474,57 | | |
| ÷ lupago | 186,00 | | |
| | | | 288,57 |
| Kampanjo Reisæter: kapitalo je 1/1-74 | 5 100,00 | | |
| + donacoj en 1974 | 2 600,00 | | |
| | 7 700,00 | | |
| ÷ deficito 1974 | 3 217,84 | | |
| | | | 4 482,16 |
| «Esperanto-nytt» | | | 3 465,76 |
| La Propaganda Fondaĵo | 11 003,16 | | |
| + rentumoj | 314,50 | | |
| + enspezoj | 230,00 | | |
| | | | 11 547,66 |
| Konservataj klubkasoj | | | 1 165,50 |
| Garantifondaĵo dumvivaj membroj | | | 2 396,00 |
| Koresponda instruado | | | 40,00 |
| | | 30 434,61 | 30 434,61 |

Oslo, la 31an de Decembro 1974 / la 27an de Februaro 1975

*Aslaug Refsing* *John Selbekk*
revizoroj

*Aase Haube Nielsen*
kasisto

# Budĝeto de N.E.L. 1975

Por klare montri al la membraro la ekonomian situacion la estraro decidis ĉi-jare publikigi la budĝeton, kiun ni sukcesis starigi, kaj laŭ kiu ni devas labori.

*Elspezoj:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Oficejo: | luo | 2 300,— | |
| | elektro | 850,— | 3 150,— |
| Havaĵo: | amortizo | | 170,— |
| Administrado: | afranko | 1 380,— | |
| | poŝtkesto | 10,— | |
| | riparo de maŝinoj | 100,— | |
| | asekuro | 230,— | |
| | telefono | 350,— | |
| | papero, presaĵoj | 1 000,— | 3 070,— |
| Propaganda: | gazetara servo | 1 600,— | |
| | alia propag. | 300,— | 1 900,— |
| Kotizoj: | al U.E.A. | 600,— | |
| | al distriktoj | 160,— | 760,— |
| Vojaĝoj, telegramoj k. c. | | | 1 000,— |
| Norvega Esperantisto: | presado | 7 500,— | |
| | distribuado (afranko) | 950,— | 8 450,— |

*Enspezoj:*

| | | |
|---|---|---|
| Kotizoj de kluboj | 7 600,— | |
| Kotizoj de rektaj membroj | 3 000,— | |
| Kotizoj de subt. membroj, apogmembroj | 250,— | |
| Abono Norvega Esperantisto | 1 600,— | |
| Preskontribuo N.E.F.A. | 500,— | |
| Rentumoj | 150,— | |
| Lukontribuo Klubo Esperantista, Oslo | 600,— | |
| Kontorfondaĵo | 1 800,— | |
| Kampanjo Reisæter | 3 000,— | |
| | 18 500,— | 18 500,— |





## Recenzoj

Pollando, Nombroj kaj Faktoj.
Eldonejo Interpress, Varsovio 1974

Malgrandformata kajero pli ol 100-paĝa kun informoj pri la lando Pollando. I. a. ĝi havas interesan historian superrigardon kun pli gravaj eventoj jaron post jaro, informoj pri loĝantaro, ekonomio, politiko, socialpolitiko ktp. Speciale interesaj estas, laŭ mia vidpunkto, la ĉapitrojn «La kultura vivo» kaj «La esperantista movado en Pollando». Valorigas la libron 30 paĝoj kun tutpaĝaj bildoj, pluraj en koloroj, el la nuntempa Pollando.

Boken er et hefte i stil med de nå så kjente «Facts-about»-bøkene som bl.a. Aftenposten har utgitt. *Haro*

Sun Vukong Trifoje Batis Skeletospiriton. Bildoj de Ĝaŭ Hongben, Kian Hiaŭdaj. — Teksto de Vang Hingbej.

110 paĝoj bildoj — en pura ĉina stilo, nigre/blankaj strekdesegnaĵoj. Al ĉiu bildo tre mallonga teksto. Kaj jen ni prezentiĝas al parto de mita romano el la 16-a jarcento. La kreinto de la romano estas Vu Ĉeng, kaj la tuta romano temas pri la heroo Sun Vukong, kiu havas grandan magian kapablon. Komence li ribelas kontraŭ la ĉielo, sed konvertiĝas al budhismo kaj iĝas protektanto de budhaj pastroj dum pilgrimado. Kaj jen la temo de nia libro: Dum la pilgrimado la bonzoj venas al spiritoplena kaj tial danĝera tereno. Nur Sun Vukong havas la eblon malkaŝi la danĝerojn, dum la pilgrimantoj falas en la reton de la malbonaj spiritoj. Eĉ la trifoja senvualigo de la skeletospirito ne malfermas la okulojn de la bonzoj, kiuj kredas ke la heroo mortigis senkulpajn homojn, kaj forpelas lin. — Amuza fabelo kiu same bone kiel niaj norvegaj popolfabeloj povas esti legaĵo por infanoj.

Bildebok m. typiske kinesiske strektegninger i sort/hvitt presenterer et eventyr med en kinesisk utgave av Askeladden som kjemper med troll.

*Emulo*

Antaŭ kaj post ŝtormo. Bildoj de Vej Giangfan, Vu Janhiu, Goŭ Sicong. — Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1974.

Jen 36 paĝa kajero kun koloraj bildoj kaj mallonga teksto — tre simpla: soldato transportas militekipaĵojn per ĉevalĉaro al la fronto, sed la vetero iĝas treege malbona. Vilaĝanoj helpas lin kaj tiel substrekas la unuecon inter la popolo kaj la armeo. Sufiĉe neinteresa libro kun pure politika enhavo.

Kinesisk bildebok med rent politisk innhold om samhold mellom folk og hær. *Ro.*

### Korespondu!

55-jara pedagogino deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo pri popolarto, popolkanto, vojaĝo, eble ŝanĝi diskojn, manlaborojn. S.ino Nóra Agóes, H-1028 BUDAPEST, Dimitrov ut. 87. Hungario.

# Norvega Kroniko

**KLUBO ESPERANTISTA EN OSLO**

20/1 1975:

Al ĉi tiu kunveno de la nova jaro la prez. bonvenigis kaj deziris ke ĝi estu laborplena jaro. Aslaug Refsing kaj Harda Danielsen partoprenis turistvojaĝon en Ĉinujo. Ili montris belajn lumbildojn kiujn ili faris, kaj rakontis pri siaj travivaĵoj kaj pri la impresoj dum la vojaĝo. Rolf Bugge-Paulsen fariĝis 80-jara la 11. de Decembro, kaj C. Støp-Bowitz informis ke li elektiĝis kiel la unua honora prezidanto de N.E.L. — Rolf Bugge-Paulsen dankis pro la granda honoro kiu montriĝis al li, kaj lian dankleteron al la estraro de N.E.L. referis de C. Støp-Bowitz, kiu poste iom referis de la lastpasinta estrarkunveno de U.E.A. kiu okazis en Roterdamo, aparte pri la financa stato de U.E.A.

Vendiĝis libroj por 356,50 kr.

5/2-75. Post bonvenigo de la prez. ni aŭskultis al diskoj kun esperanta teksto prezentitaj de Otto Prytz. Estis belaj melodioj de Brazilo, Finnlando, Japanujo, Usono, Bulgarujo kaj Nederlando, kun kantoj kaj de solistoj kaj de ĥoroj. Fine li admonis al la klubanoj demandi en la butikoj pri Esperantaj diskoj.

Vendiĝis libroj por kr. 121,30.

Raportis *O.K.*

# Duobla postkongreso

Post la kongreso en Kopenhago okazos duobla postkongreso, unue en Århus la 3.—6. de Aŭgusto, poste en Gotenburgo la 6.—9. de Aŭgusto. Oni preparas valorajn programojn, grandparte turismajn. Aliĝilojn, detalajn informojn kaj turismajn prospektojn en Esperanto oni povas peti, pri Århus: Postkongreso de Esperanto, Hørmarks Allé 5, DK-8240 RISSKOV —ÅRHUS, Danujo; pri Gotenburgo: Postkongreso de Esperanto, box 55028 S-400 53 GÖTEBORG, Svedujo. — Norvegoj povos kun profito iri per ordinara bileto nur ĝis Gotenburgo, kaj daŭrigi per malmultekosta rondvojaĝa bileto Gotenburgo—Kopenhago—Århus—Gotenburgo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND
*(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 1 00 30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo:*
Boks 942, Oslo. Postgiro 1 00 32

ESPERANTOFORLAGET A/S
*(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 1 00 31
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 1 33 29

*La redakcio:*
Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N. Telefon: 77 6 20

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*
Boks 942, Oslo 1

Trykt i HAAVES BOKTRYKKERI, Brumunddal